7-a JARO, N-o 316



LEIPZIG, 23. / 10. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

RELIGIO KAJ MILITISMO EN PORTUGALIO

La religia ekspluato

La religio ĉie ludas la rolon de protektanto al la patrioj de kapitalismo. Kiam milito eksplodas, jen la pastraro, ĉiuflanke de la tranĉelinio, krias, ke dio protektas ĝian patrion; tiel ni havas duvizaĝan patrion . . . Por ke la popolo eltenu sian mizeran vivostaton, la religio ludas la plej abomenan rolon.

Portugalio estas lando de malklero; el ĝia loĝantaro 95% ne scipovas legi laŭ pesimistaj kalkuloj; laŭ optimistaj, *nur* 75%! La kampara loĝantaro estas simpla, naiva, malklera. En vilaĝoj kino, radio, telefono estas nekonataj; eĉ oni malkonas la valoron de la aboco! Ĉe tiaj popolamasoj la pastroj regas kiel diktatoroj; al ili venas nutraĵoj, riĉaĵo . . .

Al Lurd (*Lourdes*), Francio, ĉiujare pilgrimis centoj da portugalaj religiuloj. Multaj malsanuloj vojaĝis kun espero pri mirakla kuraco dank' al la sinjorino, kiu montriĝas en la kavaĵo. Sed la profiton de tiuj vojaĝoj en eksterlandon tute ne partoprenis la portugala pastraro, k en tio ĝuste kuŝas la danĝero . . . Do, kion fari por eviti la malutilon? Tion, simple: eltrovi en la lando ian "sinjorinon", fari el ŝi miraklulinon; poste krii ĉiuflanken — certe kun apogo de l' registaro — ke oni devas agi patriote, tio estas restigi la monon en Portugalio, ne plu vojaĝante al Lurd. Jen bona ideo!

Tion ĝuste trafis la reprezentantoj de dio sur tero. En 13. majo 1917, en montosupro, kie nur paŝtistoj promenas, sinjorino de Fatima aperis sur arbo al tri knabetoj, malkleraj, naivaj, kiel ĉiuj portugalaj paŝtistetoj. El tio sekvis, ke oni konstruis kapelon en la sama loko de la miraklo, k fontanon por liveri miraklan akvon.

De jaro al jaro la klientaro de la sanktaj sinjorino k akvo plinombriĝas; k rezulte ankaŭ la mono amasiĝas en la kofroj de la pastroj. Post jaroj oni konstruis preĝejon; ĝi montras la prosperan gradon de la negoco. Sed nuntempe la mono estas tioma, ke oni entreprenis la konstruadon de granda katedralo laŭ impona stilo. La negoco ŝajnas marŝi sur glata vojo, ĉar la diktatura situacio estas inklina al tiu fiularo; k la plibonigoj en la sanktulinejo estas konstantaj, tiel ke baldaŭ Fatima nenion envios al Lurd.

La pilgrimoj al Fatima okazas ĉiumonate, en 13-aj tagoj; sed la plej multe partoprenataj estas je 13. majo k 13. oktobro. La miloj da pilgrimantoj tie pasigas la nokton, ĉar frumatene, ĉe la sunleviĝo, okazas la miraklo: la sinjorino sin montras al la kredularo. La procesio de lumoj k la procesio de la sinjorino, dum kiuj oni svingas en aero naztukojn, estas, laŭ diro de personoj ĉeestintaj ilin, imponaj. La ceremonioj de Lurd estas severe imitataj.

Pilgrimantoj estas plej klasdiversaj personoj; malriĉularo estas la grandega plimulto. El malproksime miloj da aŭtoj alvenas, multaj kamparanoj marŝas kilometrodekojn piede. Personoj el urboj ankaŭ alvenas, se ne pro kredo, almenaŭ ĉar tio estas laŭmoda. Ĉiufoje la pastraro rikoltas grandegajn sakojn plenajn da moneroj, bankbiletoj, juveloj, ktp. Jen la celo trafita!

Nuntempe la patrio ŝuldas al religio valoran servon: dank' al tiu genia eltrovaĵo, neniu plu bezonas doni monon al eksterlando, oni simple donu ĝin al la pastroj de Fatima!

Kaj kiom gajnas la laboristoj, kiuj konstruas la novan templon? Kiom da horoj ili laboras?

La salajro por masonistoj estas 12—14 esk. tage; por ŝtonlaboristoj k ĉarpentistoj 15—18 esk. (1 esk. = 0.05 dol.). La simplaj laboristoj ricevas 8—10 esk. Sufiĉas por ke ili ne mortu pro malsato. La 8-hora labortago tute forestas, malgraŭ tio ke ĝin devigas ŝtata leĝo. La laboristoj en Fatima laboras de sunleviĝo ĝis noktiĝo . . . Devige ili donas sian kotizon por la gloro de la sanktulino!

*

La militismo

Nun alia ĉapitro de ekspluato . . .

Kiel kompletigon al artikolo „Ankaŭ en Portugalio oni militpreparas", aperinta en n-o 304 de "S-ulo", mi aldonas la sekvantajn nombrojn el la ŝtata buĝeto por la jaro 1930/31.

Sume la ŝtataj elspezoj atingas 2 098 464 kontojn (*konto* = mil eskudoj). *Nur por militaferoj* la ŝtato elspezas:

Milita ministerio	329 039	kontoj
Marafera ministerio . . .	160 335	„
Polico, nacia gvardio ktp.	90 281	„
Dogana gardistaro	42 928	„
Sume:	622 583	kontoj

Tio signifas, ke nur por la defendo de la ŝtato oni konsumas pli ol kvaronon el la tuta buĝeto. Sed ni rigardu pli okulfrapan bildon: la kleriga ministerio elspezas jare 178 415 *mil-eskudojn,* aŭ pli ol la *kvaronon* el la elspezoj por la ŝtata defendo aŭ iom pli ol la *deksesonon* el la tuta buĝeto.

Certe la popolo multe pli ŝatas bonvestitan k bonnutritan gvardion k armeon ol lernejojn . . . Rezultas el tio, ke en Portugalio estas 75% ĝis 95% da analfabetoj. Vera edeno, ĉu ne?

Mi kredas, ke malmultaj nacioj atingas tiun militeman gradon. Kaj oni parolas tie ĉi pri la militismo de la grandaj nacioj!

SAT-ano 1635 (Lisboa).

A. B. F. — Kleriga Asocio de Laboristoj en Svedujo

Estis en la jaro 1912. La svedaj laboristoj grandamase rajtiĝis diri sian opinion pri la politiko en la lando; la demokratio faris gravajn gajnojn k la laboristaro komencis penetrigi en la lokajn parlamentojn siajn reprezentantojn. La gvidantoj de la laboristaro, kiuj antaŭvidis la malvenkon, se la laboristoj ne edukus sin por la novaj taskoj atendantaj ilin, diskutis la eblon organizi edukan agadon inter la laboristaro. Sed ĉar temis pri plenaĝuloj, oni devis esti tre atentema. La eduka laboro ne estus deviga, ne limigita kiel la lerneja, sed tute memvola k libera laŭ siaj formoj. Sur tiu grundo oni fondis asocion, kiu ricevis la nomon *Arbetarnes Bildnings-Förbund* k la komencliteroj *A. B. F.* estas nun pli konataj ol la tuta nomo. De tempo al tempo oni poste elpensis novajn formojn por la studlaboro k la organizado de tiu laboro, k hodiaŭ ĝia modela organizmaniero staras eĉ kiel imitinda por multaj aliaj organizoj.



La Birkahalo kun 40 lokoj

Ne politika, ne religia nur eduka

La kleriga asocio konsistas el 35 al la landa organizo aliĝintaj sindikatoj, el kooperativoj, socialdemokrataj partio k junulara asocio, komunistaj partio k junulara asocio, sindikata asocio, anarkista asocio, abstinenca ordeno *Verdandi* ktp.; el preskaŭ ĉiuj laboristaj organizoj de Svedujo, k la membraro atingis en la lasta jaro preskaŭ unu milionon k duonon. La estraro estas demokratie elektata k en la kadro de l' statutoj la membroj havas plenan liberon. Plej supre estas reprezentantaro da 21 personoj el la aliĝintaj organizoj k la asocio havas centran oficejon, kiu prizorgas korespondadon, disdividon de la ŝtat-subvencioj, starigas k organizas lekciojn k kursojn, eldonas studplanojn pri studotaj temoj ktp. La reprezentantaro elektas inter si plenum-komitaton konsistantan el ses personoj. Ĉi tiu kontrolas la studkomitatojn, kiuj estas sep. La membroj de tiuj komitatoj estas kompetentuloj rilate al sia temo k ellaboras studplanojn, donas konsilojn, k helpas al la studantoj, se ili tion deziras.

La aliĝintaj ĉeforganizoj pagas kotizon da 5 oeroj (kvin centonoj da krono[1]. La ŝtato donas subvencion por la agado de l' asocio, sed ankaŭ al la aliĝintaj lokaj organizoj. Por aĉeto de libroj al la studantoj la ŝtato donacis en la pasinta jaro preskaŭ 95 000 kronojn, por lekcioj k universitataj studrondoj pli ol 51 000 kronojn k por administrado 26 000 kronojn. La asocio eldonas propran gazeton k kunlaboras en la regna radia programaro en la popolaltlernejo de Brunsvik k. a. edukorganizoj. A.B.F. kutimas ankaŭ ĉiusomere aranĝi studvojaĝojn en k ekster Svedujo k ankaŭ libertempajn vojaĝojn, ĉe kiuj oni malkarigas la prezojn ĝis duono de la ordinaraj kostoj.

En la diversaj gubernioj (svede *Län*) oni havas distriktajn organizojn, kies estraroj elektas instruktoron por la eduka laboro. Tiuj instruktoroj havas intiman kontakton kun la centra gvidantaro de l' asocio k helpas al la lokaj organizoj organizi la studlaboron k raportas al la centro pri la spertoj de sia agado.

La lokaj organizoj konsistas el filioj k sekcioj de tiuj asocioj, kiuj estas aliĝintaj al la regna A.B.F. Ilia tasko estas difini la starigon de studotaj temoj en sia regiono, havigi subvenciojn por la laboro de societoj k komunumoj, respondece administri la laboristajn bibliotekojn k zorgi pri ilia evoluo, akceli planigitan kunlaboron inter la organoj de l' eduka laboro en la regiono interne k ekster la laborista movado k kiel eble plej intense altigi la intereson pri studlaboro ĉe la laboristoj de la regiono.

La studo estas praktikata per studrondoj

La bibliotekoj estas la kerno, ĉirkaŭ kiuj la studrondoj laboras. Studrondo konsistas el deko ĝis dudeko da Ge-k-doj, kiuj havas intereson pri sama temo. Ili interrenkontiĝas unu aŭ du fojojn dum la semajno. Unu el ili estas studgvidanto, raportas al la loka organiza estraro pri la nombro, la kostoj de ejo k materialo, la studata temo k la nomo de l' instruanto — se estas tia.

Laŭ la laborformoj de la studrondoj ili estas dividitaj en ses grupoj, nome universitataj, lekciaj, korespondaj, lernejaj, paroladaj k legaj, k diversaj studrondoj.

(Finota.)

[1] Sveda kr. = proks. 0.30 dolaro.

PANIKO EN JAPANIO

En la unua duonjaro, kronika malviglo de japana ekonomio rapide disvolviĝis ĝis paniko. Eksplodis amaso da kontraŭdiroj de l' japana kapitalismo pro disvastiĝado de l' tutmonda paniko, akcelate de enkonduko de ora normo k industria raciigo. Akriĝo de l' kontraŭdiroj de l' mondekonomio en la tria epoko vundis fatale Japanion dependantan en sia ekzisto de l' eksterlanda merkato. Ni rigardu, kiel statas la paniko en Japanio.

Pro troa produktado k troa malkresko de konsumo, la prezoj rapidege malaltiĝadas, tio estas je 18% dum julio 1929 ĝis julio 1930. Tiu prezmalaltiĝo perforte sekvigis malpliigon de ĉiuj salajroj, kio kaŭzas absolutan mizerigon de laboristaj vivkondiĉoj. Prezo por kotonfadeno malaltiĝis je 31%, silkfadeno je 28% dum tiu ĉi duonjaro, kiuj estas la plej gravaj eksportaĵoj de Japanio; kompare kun prezoj en antaŭjaro, kotonfadeno malaltiĝis je 50%, silkfadeno je 36%. Prezentu al vi panikan staton, kaŭzitan de duoniĝo de prezoj de plej gravaj varoj en la lando.

Kune kun tia malaltiĝo de ĉiuj prezoj en la lando, la eksterlanda merkato malvigliĝis. La paniko en Usono signifis malakcepton de silkenporto je 50% kompare kun tiu en lasta jaro. La tuta eksport-monsumo en tiu duonjaro malgrandiĝis je 28% kompare al la lasta. Tia fenomeno okazas ne nur en Japanio, sed en ĉiu imperiista lando, tamen evidentigas al ni, kiel turmentas tia malgrandiĝo de eksterlanda merkato la japanan ekonomion. Ĝi kunportas panikan staton en navigado, kie la ŝarĝopago preskaŭ duoniĝis, sed la ŝarĝa kvanto malmultiĝas, k malfunkciantaj ŝipoj nombriĝas pli ol duon-milionon da tunoj. Eĉ funkciantaj ŝipoj suferas duon- aŭ trioniĝon de ŝarĝo.

Malaltiĝo de ĉiuj prezoj, malviglo de l' merkato, superfluo de varoj akrigas la kontraŭdiron inter produktopovo k produktado ĉe ĉefaj industrioj: ŝtataj fabrikoj funkciigas nur 50% de sia kapablo, cemento 43%, kotonfadeno 66%, papero 65% k silkŝpinado, karbo k. m. a. ankaŭ limigas sian funkciadon je 20—30%. Preskaŭ ĉiuj mezskalaj ŝpin- k teks-fabrikoj ĉesigas sian produktadon.

Eĉ potencaj karteloj elmontras sian senpovon ĉe la paniko, akcelante krizon per senkontroleco super produktado.

La produktado de ĉiuj industrioj haltas aŭ ĉesas en tiu duonjaro kun kreskanta proporcio, sed aliflanke la produktopovo estas altigata per raciigo, k mez- aŭ et-skalaj fabrikoj sekvadas unu post la alia per labor-

ĉesigo, laŭnombre 30—40 ĉiutage nur en Tokio, pliigante senlaborulan nombron po 2 mil ĉiutage, kies tuta nombro kalkuliĝas je pli ol 1500 mil, eĉ laŭ observo de l' burĝaro.

La senlaboruloj estas tute malfavorataj je kromsalajro ĉe sia maldungiĝo; krome en Japanio ne ekzistas senlaborula asekuro, tial ili devas suferi malsaton tuj post maldungiĝo. Teks- k ŝpinistinoj ne ricevas salajron nek pagon por vojaĝado al siaj hejmoj. Ankaŭ laboristoj ne trafitaj de senlaboreco devas suferi du- aŭ trioniĝon de siaj labortagoj k ofte ne ricevas plene sian salajron. 90 mil teks- k ŝpinistoj estas forpelitaj en tiu ĉi jaro.

Reiro de laboristoj senlaboraj al la kamparo pliintensigas la krizan staton de l' japana terkulturo. La kamparanoj forlase vendas kokonon je prezo malplia ol kosto mem. Per silkvermkulturo en tiu ĉi printempo ili perdis 15 milionojn da jenoj, tio faros en la tuta jaro 40 milionojn. Pri troa malkariĝo de terkulturaj varoj ni sciu per la fakto, ke oni povas aĉeti dekduon da cigaredoj (1/10 jeno) per 50 brasikoj. La tuta monsumo de terkulturaj produktoj en Japanio estis 3300 milionoj da jenoj en 1925, sed en 1928 — 2200 milionoj, t. e. malpliiĝo je 31%. La japana burĝaro jam delonge rezignas malvastan enlandan merkaton k per malaltigo de l' salajro sub la kolonian nivelon k giganta buĝeto por militado furioze defendas la eksterlandan merkaton. Laboristaj strikoj nombras, eĉ laŭ burĝa enketo, 728 en tiu ĉi duonjaro kun 76 791 partoprenintoj. Tio montras duoniĝon de strikoj k duobliĝon de strikintoj kompare kun la lasta jaro. Eĉ la burĝaro ne povas nei, ke tiuj strikoj okazis en grandskalaj fabrikoj kun revolucia batalemo.

Ĉe tiuj konfliktoj faŝistoj k polico kune atakas laboristojn, aŭ per larmgaso aŭ per sabro, k ne estas malofte, ke ili kaŭzas sangan aferon; por forigi timon ĉe policanoj, oni uzas ŝtalan veŝton por eviti kuglan vundon.

La ekonomia krizo en Japanio pliakriĝas pro disvastiĝo k profundiĝo de l' monda paniko. Limigite de Londona konferenco, mararmeo de Japanio intencas pligrandigi sin per buĝeto por mardefenda kompletigo, per sumo de 900 milionoj da jenoj, sed la akriĝo de l' ekonomi-krizo malstabiligas la ŝtatan financon, eĉ malaltigante la prezon de l' ŝtataj obligacioj.

Laŭ "Scienco Proleta", n-o 9, Tokio.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Kreskantaj minacoj de l' faŝismo en Germanio

En Koblenco, la administra ĉefloko de Rejnlando, antaŭ nelonge "liberigita" de "fremda jugo" (militistaro de l' okup-armeo), okazis je la 5. oktobro invado de alispecaj trupoj — militistoj-volontuloj, membroj de la reakcia militista organizo "Ŝtalkasko" (germane: *Stahlhelm*). La nombro da partoprenintoj en la manifestacio varias laŭ la indikoj de l' gazetaro inter 120 k 160 000. Pluraj eksaj princoj k ĉefgeneraloj senĝene inspektis la revue paradantajn faŝistojn, kiuj estas ĉiuhore pretaj ekmiliti por "libera Germanio", ĉu kontraŭ Francion, ĉu kontraŭ Polion, ĉu kontraŭ la enlandajn ribelantajn proletojn. Estas notinde, ke la Granda Faŝista Konsilantaro sendis el Romo specialan reprezentanton.

...kaj en Aŭstrio

Nova registaro naskita per helpo de l' faŝista "Hejmdefenda Ligo" (fratorganizo de "Ŝtalkasko" en Germanio) montras de siaj unuaj regotagoj malkaŝe sian kontraŭlaboristan karakteron, sian kunlaboremon kun la naci-socialismo (Hitler) en Germanio, sian malamon al la sociaj institucioj kreitaj en la postrevolucia periodo de la socialista komunumo Vieno. Speciale celita estas la t. n. Respublika Ŝirmligo, laborista defendligo, kiun apartenas preskaŭ ekskluzive nur organizitaj laboristoj, kreita por defendi la en jaro 1918 akiritajn rajtojn de l' laboristaro. Okazis ankaŭ konfiskoj al lab. gazetoj. *P.*

La diktaturo en Jugoslavio

La Asocio "Libera Balkano", Berlino, ĵus publikigis libron kun kolekto da leteroj k dokumentoj por elmontri k ilustri la kruelon de l' diktaturo pezanta sur Jugoslavion. Laŭ resuma statistiko okazis en 1929 38 politikaj procesoj; 105 personoj estis kondamnitaj: du inter ili je morto k 103 je punlaboroj aŭ malliberigo sumiĝantaj je 431 jaroj. Dum la unua duono de l' jaro 1930, dum 31 procesoj estas kondamnitaj 214 personoj: unu je morto; unu je dumviva malliberigo; 212 je sume 770 jaroj k 9 monatoj da punlaboroj aŭ mallibero. La statistiko pri policmortigoj ne estas kompleta, ĉar multajn viktimojn oni forigis sekrete. En j. 1929 estas murditaj aŭ ĝis morto torturitaj 54 personoj (ne entenitaj estas pli ol cent bulgaraj viktimoj, inter kiuj troviĝis virinoj, infanoj k maljunuloj). Ĝis junio 1930 oni konas nur 20 kazojn de tiaj murdoj. *C. P.*

El Hispanio

La ĝenerala striko en Bilbao (6. ĝis 8. okt.) havis politikan karakteron: ĝi estis proklamita por kontraŭstari la monarkistajn celadojn je subpremo al la laboristaro per militista diktaturo. Rezultis sangaj tumultoj, ĉe kiuj 40 personoj estis vundataj. Ankaŭ en aliaj urboj (Vitorio, Logrono, Malago) okazis je sama tempo laboristaj strikoj, manifestacioj k polictrupa pafado. *R.*

AĈETU SAT-AKCIOJN!

La Eldon-Kooperativo de SAT aperigis jam 40 diversajn librojn, inter ili tre gravajn verkojn sed **multaj pretaj manuskriptoj** atendas jam delonge sian vicon por esti publikigataj. Ne hezitu! Helpu al la eldon-agado de nia Asocio, al la plilarĝigo de la SAT-biblioteko, per aĉeto de niaj AKCIOJ! Estas 2 serioj, po unu k po duona dolaro. Ili estas repageblaj 3 jarojn post la dato de la enpago plus 10%-a jara rento (kiu validiĝas por tiuj, kiuj posedas siajn akciojn dum almenaŭ 3 jaroj). La akcioj havas konstantan aĉetvaloron en interrilato kun la Administracio k tiel estas praktika pagilo.

Ĉiu, kiu varme deziras la pluan disvolviĝon de SAT k de ĝia influo, helpos efike, deponante sian ŝparaĵon en SAT-akcioj.

Arta servo dum politika agitado

Sibarto (Siberia arto) organizis "bazon" por arta priservo de popolaj mastrum-politikaj agitadoj. Tasko de l' "bazo" estas organizado de tuta profesia k iniciativa arto sur kampo de politika agitado.

Por priservo de nuntempaj kampanioj (kolektado de pano, aŭtunsemado) la "bazo" volas sendi 20 teatrajn brigadojn al karbminejaj k agrikulturaj regionoj k 80 filmojn, tri specialajn kino-gazetojn. Oni volas ankaŭ krei avangardajn brigadojn el literaturistoj por ricevi necesan repertuaron, sendi radio-aparatojn ktp.

La "bazo" invitas la asociojn helpi per sia atento aferon pri arta propagando de partia politiko.

Gala Petrova (15 295).

TIUJ PORKOJ-JUNULOJ

Maljuna Jozefo Simpson estus fariĝinta ideala "viro de la mastro", se li nur estus iomete pli inteligenta. Kiel okazis, li laboris laŭ kapablo, k sentis tedon havi konstantan okupon, dum aliaj estis senlaboraj.

Li havis teorion, ke la mastro estas bonkora al tiuj, kiuj restas fidelaj; tial Simpson havis bonan kialon pensi, ke lia ofico estas sendanĝera. Li estis ano de sindikato, ĉar li estis devigata.

En sia sindikato, kiel en la laborejo, li estis reakciulo — konservativa laboristo. Plej malbone estis, ke multaj el liaj kunlaboristoj rigardis lin kiel inteligentan, ĉar lia malrapida, singarda maniero de parolo donis al li la aspekton de pensulo.

Tial okazis, ke kiam ĉe la laborejkunveno oni antaŭmetis proponon, ke plenaj rajtoj estu donitaj al la junuloj inter la aĝo de dek-kvar k dek-ok jaroj, "Maljuna Joĉjo", kiel li familiare nomiĝis, faris sin la centro de la kontraŭopinio.

Entuziasma, inteligenta junulo, Hanĉjo Redŭej, klarigis la argumentojn de la junaj laboristoj per malmultaj simplaj frazoj.

"La junuloj", li diris, "devas havi plenan voĉon en ĉiuj aferoj efikaj sur la laboristojn en la fabriko. Jam centfoje okazis, ke junuloj estis devigataj fari la laboron de viroj, k eĉ filabori dum striko, nur pro manko de organizo k subteno. Oni ne devas permesi ke tia situacio daŭru, k mi esperas, ke ĉiuj membroj subtenos la proponon."

Kelkaj aplaŭdis, sed la plimulto restis silenta.

Maljuna Joĉjo stariĝis, lia vizaĝo ruĝa pro indigno.

"Nu, vi", li diris raŭke, forgesante en sia kolerego alparoli la prezidanton. "Mi volas ekscii, kiu instruis al vi, konsideri vin je la sama nivelo kiel la plenaĝuloj. Ĉu vi pensas, ke ni permesos al vi enmiksiĝi en niaj aferoj?"

Li daŭrigis per kelkaj atentigoj pri sia propra brila kariero, komencante per "Kiam mi havis vian aĝon . . ." k finante per alvoko al la membroj, teni la junulojn en ilia propra loko.

Lia prestiĝo venkis, k la propono malsukcesis per malgranda plimulto.

Kuriozaj koincidoj okazas en tiu ĉi mondo, k tiu, kiu okazis je proksima pagotago, preskaŭ turnis la cerbon de Maljuna Joĉjo. Lia koverto estis pli dika ol kutime, k dolĉaj revoj pri krompago naĝis tra lia menso.

Per fuŝaj fingroj li ŝirmalfermis la koverton k elverŝis la enhavon en sian manplaton. Du funt-bankbiletoj, kelkaj arĝentmoneroj — k paperpeco surskribita. Ĉe la supro li komprenis sian propran nomon, sed ne povante legi klare, li ne daŭrigis.

"Jen, juna Hanĉjo" li diris, "ĉu vi povas legi tion?". Hanĉjo prenis ĝin k legis:

"Estimata Sinjoro Simpson, ni bedaŭras anonci, ke la direktantoj trovas, ke vi ne plu estas kapabla sufiĉe fari vian devon k esperas, ke vi baldaŭ trovos pli malpezan okupon aliloke — via ktp., Ŝvitiganto k Kompanio".

Maljuna Joĉjo ekspiris, tiam, ekvidante la ĉeflaboriston turniĝanta laŭ la angulo, rapide postkuris lin. "Hej, Jakĉjo" li kriis, svingante la paperon, "kion signifas tio?"

"Ĝi signifas", diris la ĉeflaboristo malrapide, "ke knabo povas funkciigi la maŝinon, ĉe kiu vi estas, k la direktantoj volas ŝpari."

Maljuna Joĉjo blasfemis. "Tiuj porkoj-junuloj denove" li murmuris ĉagrene; "ili ne scias teni la propran lokon nuntempe."

Li ŝajne ne memoris, kion Hanĉjo Reduej diris ĉe la laborejkunveno!

Trad. el "Daily Worker" (London),
W. G. Keable (12 668).

SOVETIANOJ,

kiuj dum jaroj abonis regule "S-ulon", nun ne plu povas plilongigi sian abonon pro neeblo de transpago.

Abonu ci por cia K-do en Sovetio

nian gazeton, ĝis la monrilatoj estos ree normalaj! (Monon sendu al Administracio de SAT.!)

Tiel vi helpos efike al li k al SAT!

Korekto. — Legu en n-o 314, fruntpaĝo, 3-a kol., lin. 21 de malsupre "kiel" anst. *kie* (sen tiu korekto la tuta frazo fariĝas nekomprenebla).

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 312, 313, 315)

Inter la tria k kvara horoj posttagmeze, malkovrita aŭtomobilo, kiu estis videbligita kiel sanitara aŭtomobilo, veturis tra Lastenstrato kun du grave vunditaj virinoj; la unua virino havis pulman enpafon, la alia enventran pafon. La strato estis je tiu tempo preskaŭ malplena je homoj. Oni vidis nenian kolektiĝon homan. Kiam la sanitara aŭtomobilo preterveturis je *Planetarium,* ĝi estis submetata al boncelita pafado, de aro da policanoj, kiuj staris ĉe la naturhistoria muzeo. Unu pafo frakasis la kranion al unu el la virinoj, kiu ekmortis. La aliaj pafoj vundis du sanitarulojn.

Denove *Planetarium.* Je duono post la kvara polica salvo estis "puriginta" (seniginta je homoj) la Lastenstraton antaŭ *Planetarium.* Sekve de tiu "purigado", la strato estis malplena je homoj. Matio Suĥer, kiu prizorgis la sanitaran servon, haltigis la aŭtomobilon, elsaltis por bandaĝi vunditon. Dum li klinis sin super la vunditon, falis dua pafo, kiu trafis la vunditon en la kapon k mortigis lin. Suĥer salte leviĝis k perceptis trans la strato, kiel policano ĵus reprenis la karabenon. Li rapidis al la policano, kiu denove celis, pafis k vundis Suĥer je la brako.

Je la dekkvina polica kordono okupis Lerĥenfelderstraton, ĉe angulo de Lastenstrato. La trafiko ne estis barita, en la strato iris kelkaj homoj. Inter la promenantoj estis ankaŭ junulo, kiu iris tra la polickordono en la direkto de Gürtel sur la trotuaro. Kiam li estis je ĉ. tridek paŝoj distance de la kordono, iom aĝa policano per sia fusilo celis al la junulo k pafis. Ĉi tiu morte falis kun tempio trapafita.

Ĉirkaŭ la dekkvara policano estis surprize atakita de aro da manifestaciantoj. La ordiganto Bezpalec rapidis por helpi al la atakito, liberigis lin de la amaso k kondukis lin al la plej proksima polickordono, por meti lin ekster danĝeron. La policanoj prenis la fitraktitan policanon, k Bezpalec foriris. Apenaŭ estis li turninta la dorson, kiam unu el la policanoj de l' kordono direktis la fusilon kontraŭ li, celis k teren pafis lin. La kuglo trafis la lumbon. Bezpalec mortis post dufoja operacio la 17-an de julio.

Antaŭtagmeze, la 15-an de julio estis instalita, sanitarejo en la korto de la urbdomo, situita al *Liĥtenfelsgase.* En la unuaj posttagmezaj horoj la kradopordego estis ŝlosfermata. En la korto k en la koridoro la pordego kuŝis k staris vunditoj, kuracistoj k sanitaruloj. Granda ruĝkruca flago signis tiun ĉi lokon kiel sanitarejon. Inter la dekkvina k deksesa horo aro da policanoj (ĉ. dekdu ĝis dekkvar homoj) marŝis al la ŝlosita pordego, stariĝis tie kontraŭ la sanitarejo. La vunditoj, kuracistoj k sanitaruloj terure ekscitiĝis. Laŭtiĝis vokoj de indigno. Sed okazis neniu efektiva atako al la policanoj, kiu cetere estus neebla, ĉar la polico estis protektata antaŭ la homoj en la sanitarejo per ŝlosita kradpordego. Sed apenaŭ la policanoj ekstaris antaŭ la pordego — en tiu momento alpaŝis ilin supera policoficiro, laŭdire polickonsilanto Kraft — kiam ili subite pafis salvon k post kelkaj minutoj duan k poste serion da izolaj pafoj al la sanitarejo. De vundito, kiu kuŝis en la korto, la kranio estis forŝirata, partoj de la

POR NIA DISTRO

SAĜO

La urbo Ĥelem estas loĝata de saĝuloj. Estas la Ĥelemanoj, kiuj forbruligis la domojn por mortigi la plotojn (ploto estas riverfiŝo. Ĉu temas pri idioma proverbo? *Red.*). Por ili ĉiu bagatelo meritas profundan cerbumadon.

En tiun feliĉan urbon transloĝiĝis forĝisto, kiu aspektis malhela pro la fulgokovrita haŭto. Pro tio la famo disvastiĝis, ke li estas cigano, ĉar nur cigano aspektas tiel nigra. Cigano kompreneble estas ŝtelisto. Kion fari?

La urbestraro kunvenis k pritraktis la problemon dum sep tagnoktoj. Finfine ili decidis dungi dumnoktan gardiston. Solvite!

Sed ankoraŭ ne. Post kelkaj tagoj la gardisto plendis, ke li sentas malvarmon dum la nokto. La urbestraro rekomencis la komunan pensadon. Nur malsaĝuloj decidas ion senpripense! La rezulto estis — ŝaf-fel-surtuto por la gardisto.

La gardisto denove vizitis la urbestran ĉambron. "La cigano sendube ankaŭ portas similan al mia surtuton. La civitanoj ne rekonus k eble mortpafus min."

Kunveno septaga; esplorado; pridiskuto; solvo. La gardisto renversu sian surtuton!!

Pasis kelka tempo. "Ho! vi ĉi tie! Kion nun?"

Diris la gardisto: "Mi estas bona Ĥelemano k konstante pensas laŭ la urba moro. Mi ĵus elpensis, ke la renversata surtuto aspektigas min kiel ŝafon. Lupo certe formanĝos min pro eraro."

"Vi ja estas tre pensema Ĥelemano", respondis la urbestro: "Ni tuj atakos tiun malfacilon." Li jam bedaŭris, ke oni ne estis dunginta eksterurbanon.

Post la kutima septaga pripensado oni decidis, ke la gardisto surrajdu ĉevalon. Ĉiu lupo scias, ke ŝafo ne rajdas sur ĉevalo.

Ankoraŭ ne finite. Plendis la gardisto pri malbonaj pavimoj k la eblo, ke la ĉevalo falus k la rajdanto mortus.

Ĉi foje la cerbumado daŭris dek kvar tagojn. Oni estis decidinta dum sep tagnoktoj, ke la ĉevalo estu ligota al fosto. Sed kie starigi la foston? Ĉiu estrarano opiniis la plej taŭgan lokon apud sia hejmo. Kompromise oni metis ĝin apud la banejo laŭ la riverbordo, ĉar tio estas publika propraĵo.

Tie sidadis k eble ankoraŭ sidas la gardisto, vestita en renversita ŝaf-felsurtuto, sur ĉevalo al fosto ligita k gardas la urbon kontraŭ la cigan-aspekta forĝisto.

La Ĥelemanoj gratulas sin pro sia saĝo, elektinte urbestraron, kiu tiel bone solvis malfacilan problemon.

El la juda tradukis, laŭ memoro,
Ben Odinov (13 268).

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en "S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

---

kranio, grandaj kiel manplato, alten flugis ĝis la unua etaĝo. Al aĝa viro la brusto estis trapafita. Al la helplaboristo Hajmliĥ la maldekstra okulo estis elpafita k krome la dekstra mano k brusto pafvunditaj.

Inter la naŭa k kvarono post la naŭa la komerca reprezentanto Karl Bellak iris tra *Vidner (Wiedner)* ĉefstrato. En la strato estis nur malmultaj pasantoj. Estis tie neniaj okulfrapaj homkolektiĝoj. Subite el la direkto de l' operejo al Paŭlana preĝejo krakis salvo. La homoj ili estis ĉ. dudeko, forkuris en plej alta ekscitiĝo tra *Vidner* ĉefstrato supren. Jen, proksime al Paŭlana preĝejo krakis denove tri pafoj. Unu el ili trafis Bellak en la suban makzelon. Li falis antaŭ la preĝejo. Je la sekvoj de la pafo li mortis la sekvantan tagon.

Je kvarono antaŭ la kvara polica patrolo "purigis" denove *Stadiongase*. En kafejo "Reichsrat" estis instalita sanitara helpejo. Granda ruĝkruca flago pendis ĉe la enirejo malproksimen videbla. Malgraŭ tio, sen ia motivo, la polico direktis sian pafadon kontraŭ la sanitarejon. Unu sanitara helpanto ricevis ventropafon. (Daŭrigota.)

LA KANTO PRI SORĈPOVA KREMLULO

Tial ke ni senmaskigis intrigojn kontraŭ SAT, atakante la nunan ĝeneralan sekretarion de CK de SEU, kelkiuj provas kredigi al naivuloj k neinformitoj, ke ni... atakas Sovetion. Se tiel estus, oni povus trovi tiajn "atakantojn" eĉ inter nunaj apogantoj al Drezen. Kompreneble ne decas postuli, ke ĉiu homo estu heroo, k sekve ni ne esploros la kaŭzojn pri la ŝanĝo de sinteno ĉe estintaj kontraŭuloj al la Moskva karieristo, fariĝintaj liaj nunaj subtenantoj. Sed la tuta SAT-anaro devas almenaŭ esti iom informita pri kelkaj flankoj de la historio de nia movado. Tiucele ni publikigas ĉi sube *baladon*, kies originala teksto troviĝis en iu vizitlibro de estinta Moskva Klubo. Post publikigo de seka protokolo, tiu poeziaĵo ne nur informos, sed amuzos la legantojn de nia gazeto. Duobla profito, ĉu ne? — — —

Por kompreni ĝuste la signifon de tiu versa dokumento, necesas scii, ke K-doj el Moskvo, kiuj tiutempe opoziciis al Drezen, eldonis tie la revuon "La Nova Epoko". La nomon de l' baladverkinto ni bone konas, sed nuntempe li ŝajne pentas pro tiu "atako kontraŭ Sovetio". — Li do certe ne deziras famiĝi pro tia peko.

Dume la legantoj decidu mem, ĉu senmaskigo al iu Moskva denuncisto, eĉ se li estis antaŭe lojala cara oficiro, estas ataki aŭ defendi Sovetion.

Jen kiel intencas sorĉpova Kremlul'
Revenĝi al "Nova Epoko"
Kaj tutan eldonon per tondro k brul'
Ekstermi po peco k floko,
Ĉar tiu ne estas SEU-a fili'
Kaj presi kuraĝis recenzon pri li.
Pli laŭte do muzik'!
Trumpetu venkon,
Venkita malamik'
Kaj kuras for, for, for.
Do por CK SEU
Kaj por Bulteno
Hura — hurau laŭte ĥor'!

Li sendas leteron al la redakci'
Kun reĝe-ordona postulo
Kun granda aplombo k kun afekci'
Minacas potenca Kremlulo.
Sed por ke l' afero sukcesu nun plej,
Averton li sendas al la Cenzurej'.
"Ho Moŝto Cenzura, avertas mi vin
Pri jena malbona afero,
Ke oni kuraĝis recenzi mem min
En la "Nov-Epoka" numero.
Atentu, ke mia refutoleter'
Nepreĝe aperu en tria numer'."
Tralegas denuncon cenzuroficist',
Ekkaptis "La Novan Epokon"
Kaj estas finita jen ties ekzist',
Kaj ĉifonigita en flokon.
Jen pro ambicio de l' Kremla geni'
De l' "Nova Epoko" nur restis
krani'.
Jen gaje veturas en aŭtomobil'
Heroo de nia balado.
Lin flatas de la cenzurejo hakil'...
Subite rompiĝas la rado.
Ekkrevis la bendo kun krako k
bru';
Kremlulo ne povas veturi jam plu!
Eliras Kremlulo k vidas kun mir';
Jen kuŝas "Epoka" kranio.
Do ĝi jen malhelpas al li en la ir' —
Rigardas li ĝin kun malpio:
— Denove al mi ci malhelpas, aĉul'!
Kaj jen piedpuŝas kranion Kremlul'.
Sed ĝuste en tiu ĉi bela moment'
Ekkaptas lin granda teruro:
Elrampas el ostoj kraniaj serpent'
Kaj morte lin pikas je kruro.
Jen kie sin kaŝis de l' morto fatal'!
Kaj falis por ĉiam li de l' piedestal'.

TRA ESPERANTIO

PRI LA "ĈE-METODO"

De la kvalito de l' kursgvidantoj dependas unuagrade la plua progresado de nia movado. Se ne okazus sukcesplenaj kursoj, ĝi stagnus k eĉ malprogresus, ĉar nenia progreso eblas sen replenigo de l' kadroj per "freŝa sango". Sed eĉ plej laborema, bonvola k persista kursgvidanto ne povas sukcesi, se li instruas senplane, senmetode. Tial celo devas esti anstataŭigi laŭeble la malpli taŭgan per pli taŭga metodo. La Amsterdama distrikto de l' Ned. Fed. de Lab. Esp-istoj elektis por raporti pri la tiomajn sukcesojn rezultiginta "Ĉe-metodo" specialan komisionon, kies provizora raporto ĉi sube presita certe interesos ĉiujn K-dojn. Red.

La instruado de esp-o al laboristoj estas pli-malpli sentata kiel problemo, kiun ĉiu kursgvidanto klopodas kiel eble plej bone solvi. Sed ĝis nun ĝi restis problemo dum pli k pli sentiĝas en nia movado la bezono je metodo, kiu donas rezultojn pli kontentigajn.

Nuntempe la atento de la mondo esp-ista estas turnita al la fama metodo de s-o Andreo Ĉe.

Kritikemuloj inter ni malfide aŭskultas la "tamtamon" pri tiu ĉi metodo, faratan de la burĝa esp. gazetaro. Ili rakontas pri siaj malsukcesoj, kiam ankaŭ ili foje instruis laŭ "rekta aŭ Berlitza metodo", "en kiu oni ne instruas la gramatikon" (kvazaŭ ĉiuj metodoj rektaj estas similaj). Kelkaj eĉ opinias, ke tia metodo taŭgas nur por instrui al homoj instruitaj, ne al laboristoj.

Sed se ili ne aprobas la rektan metodon, ĉu do la rezultoj de la nun aplikataj ne-rektaj metodoj kontentigas ilin? Ni rigardu la relative malgrandan kreskon de la grupoj. La rezultoj de la kursoj de eĉ la plej bona kursgvidanto plej ofte ne estas konformaj al liaj granda penado k oferado dum la tuta kurso. Tio instigu nin ne fermi la okulojn k la orelojn antaŭ la novo. Sincera, objektiva esploro pri ĉiu nova metodo estas laŭ mia opinio la devo de ĉiu serioza kunbatalanto en nia movado.

S-o Ĉe antaŭ 10 jaroj komencis la instruadon laŭ sia metodo. Notinde estas por ni, ke li tiam instruis al *laboristoj*. S-o Ĉe skribis al ni: „. . . mi devas rimarkigi, ke la rekta metodo estas utila precipe por la instruado al pli simpla publiko k mi ellaboris mian metodon ĝuste por laboristoj, kiam mi devis serĉi taŭgan instru-metodon, gvidante kurson en la Laborista Hejmo de Hermanstadt".

Lia metodo estas kombinaĵo el la rekta k la gramatika metodoj. Ĝi diferencas de la t. n. "metodo Berlitza" per tio, ke ĉi lasta igas la homojn lerni la lingvon tiel, kiel la infano lernas la lingvon de sia patrino, dum la Ĉe-metodo instruas samtempe la gramatikon.

Rimarkinde estas en la Ĉe-metodo, ke la lernantoj mem lernas trovi la lingvajn regulojn de esp-o. Tio streĉas ilian atenton k igas ilin logike pensadi. Ni foje spertis ekz., ke la lernantoj, plenatente sekvinte la instruiston, kiam li skribis frazon sur la tabulon, postulis de li *pli* konsekvencan aplikon de la tiel logikaj lingvaj reguloj ol estas kutimo en esp-o: ili nome deziris, ke s-o Ĉe skribu "kioj" en okazo, pri kiu d-o Zamenhof konsentis, ke la gramatiko de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. (Lingvaj Respondoj p. 55). Ankaŭ estis por ni surprizo, kiam ni aŭdis, ke la lernantoj mem komencis uzi la korelativajn pronomojn "kio", "kiu" ktp., kiuj ne estis antaŭe instruitaj!

La fakto, ke la instruisto estas eksterlandano, sendube helpas veki la necesan intereson k atenton. Kiam la instruisto komencas la unuan lecionon per jena (tradukata) alparolo: "Vi k mi parolas malsamajn lingvojn. Inter ni do staras alta muro, kiu malhelpas nian interkomprenon. Sed farante konversacion ni kune malkonstruos tiun muron; ni forhakos brikon post briko, vi de via flanko, mi de mia flanko, ĝis fine ni atingas unu la alian en plena interkompreno!" . . . tiam la lernantoj klare vidas sian taskon, ili sentas, ke ili havas celon, nome: kiel eble plej baldaŭ paroli kun sia instruisto, k kun ĝojaj vizaĝoj ili komencas la "malkonstruadon de la muro".

S-o Ĉe ne ŝarĝas la lernantojn per multe da vortoj k lasas la ampleksigon de la vorttrezoro al la praktiko mem. Li igas siajn lernantojn esprimi siajn pensojn en simpla maniero, se necese per ĉirkaŭ-skribo. Tio samtempe estas ekzerco en pensado.

Kiel jam dirite, la metodo ne evitas la gramatikon, sed, kontraŭe, sekvas ĝin paŝon post paŝo k tiel sisteme, ke la instruisto ne povas rompi la ordon en la kursa materialo sen malutilo por la kurso. La metodo, kiu dum la tempo pli k pli perfektiĝis, estas tute elprovita k pro tio la juna imitanto ne faru facilaniman ŝanĝon en la sinsekvo de la materialo, ĉar tio poste venĝus sin. Tra la tuta kurso iras fadeno, kiun oni devas sekvi. Tio, kio ŝajnas al ni neklara en la unuaj lecionoj, klariĝas al ni en lecionoj postaj.

La lernantoj plej ofte *kune* respondas la faratajn demandojn. Per tio ankaŭ la malkuraĝa lernanto povas akiri sperton en la parola uzado de la lingvo k fariĝi pli libera. Tamen ankaŭ la individua demandado de tempo al tempo estas aplikata. La hejma laboro de la lernantoj konsistas el la skriba respondado de demandoj, kiu maniero ne donas impreson de "ekzerco".

Eble la plej granda potenco de tiu ĉi metodo troviĝas en la *atmosfero*, kiun la instruisto per sia persono k agado kreas: anstataŭ seka lingvokurso li faras agrablan konversacion, en kiu regas la amuzo k la rido, kiuj ebligas konservi la atenton de homoj pene laborintaj dum la tago. Tiel ili lernas eĉ kontraŭvole. La metodo postulas multe da aktiveco de la instruisto k sendube ne ĉiu kursgvidanto kapablas laŭ ĝi gvidi kurson. Gaja humoro, bona voĉo, sprito, atentemo, diligento — jen nur kelkaj ecoj el la multaj, kiujn bona "Ĉe-metodisto" devas posedi. Kursgvidanto, kiu ŝatas la trankvilon k la oportunon, nepre ne apliku Ĉe-metodon!

Speciale meritas nian atenton, ke la metodo ne okupas sin pri la nacia lingvo, kiu ja ofte malfaciligas al laboristoj la lernadon de esp-o. Oni lernas rekte pensi en la lingvo, dum ankaŭ la konversacia formo de la metodo estas avantaĝo, ĉar la ordinaraj metodoj ne okupas sin pri la parolado k aŭskultado. Kaj ĝuste tio ĉi estas grava manko en tiuj metodoj, ĉar laŭ la opinio de la plej multaj simplaj homoj nur tiu "vere scias" la lingvon, kiu ĝin *parolas* k *la parolitan vorton komprenas*. Kiel ajn bone oni cetere komprenas la lingvon — tio nenion signifas, iliaopinie, se oni ne kapablas *paroli* k *aŭde kompreni*. Tial ĉi metodo estas ankaŭ rekomendinda al tiuj inter ni, kiuj ankoraŭ timas malfermi esp-e sian buŝon.

Tamen oni ne pensu, ke la metodo faras el la lernantoj tiajn esp-istojn, kiaj post la kurso scias perfekte paroli en esp-o pri ĉiu temo. Certe ne!

La Redakcio posedas sufiĉe da presinda materialo,

sed ĉe nuna amplekso de "S-ulo" neeblas aperigi ĉion valoran!

La 12-paĝa "S-ulo" estas imperativa neceso! Ĝi estas rezulto de via senlaca agado!

ESTU ĈIU VARBANTO, POR KE PLIGRANDIĜU LA ABONANTARO

laŭ pli rapida ritmo . . . .

Sed jam tre kontentiga estas la rezulto de la kurso, kiam la vortoj pli facile fluas el ilia buŝo k kiam ili havas tiom da scio k kuraĝo, ke ili ekster la kurso facile povas pliperfektigi sin en la parola uzado de la lingvo.

Entute — la metodo ŝajnas al mi speciale taŭga por laboristoj.

F. Faulhaber.

Mia sperto pri lernaj murgazetoj en esperanto

En kurso por kooper-aktivuloj, kie mi instruis rusan lingvon k matematikon, mi aranĝis novtipan murgazeton, *lernan murgazeton*. Ĝi estis (1½×1-metra) dividita en 6 partojn (kolonojn): socisciencо, rusa lingvo, matematiko, kooperado, *esperanto* k "kursa vivo". Ĉar la gazeto estis "lerna", ĝi ne aperis regule, sed post preparo la artikoloj estis laŭvice surgluataj per supraj siaj partoj sur suprajn partojn de antaŭaj artikoloj. Tiel ĉiu kursano havis eblon relegi la antaŭajn artikolojn. Tiela gazetaranĝo, laŭ kursejaj kondiĉoj farita, ebligis 1) legi ĉiujn artikolojn al kursanoj, kiuj iel ne vizitis la kurson dum kelka tempo; 2) ripete legi ajnajn artikolojn por pli bone memorfiksi ilian enhavon; 3) ŝpari lokon sur la muro, ĉar "lerna murgazeto" ne estas kutima politika murgazeto, kiu estas anstataŭata post nelonge de alia n-o. Ĝi restas tiom longe, ĝis ĉiuj bone trastudis ĝian enhavon.

Kiam algluitaj artikoloj tromultiĝas k la uzo de l' gazeto iĝas maloportuna, laŭ neceso k deziro kelkaj supre troviĝantaj artikoloj estas transportataj sur alian preparitan murgazeton, k super ili estas algluataj novaj artikoloj.

Nun pri la esp-a parto de l' gazeto. Ĉar ĝi estis destinita por kooperistoj, mi verkis specialan kurson por ili; ĉiuj ekzemploj, artikoloj, ekzercaro estis prenitaj el la literaturo pri koopera movado. Tiel la kurso speciale interesis tiujn lernantojn. Laborante nun en iu presejo, mi preparas laŭcelan esp. lernan gazeton por instrui al presejlaborantoj.

Estas dezirinde, ke esp-istoj, speciale pedagogoj, aranĝu similajn gazetojn en siaj laborejoj, lernejoj, kursejoj, eluzante la ideon pri tiu nova variaĵo de murgazeto. Kiu interesiĝas pri detala aranĝo k gvido de "lernaj murgazetoj", skribu al: *Moskvo*, Centro, poŝtkesto 710.

Iv. Lidin (41).

Ĵus aperis
kiel 11-a volumo de "Biblioteko de Sennaciulo" belega
POEMO DE L' PLUGISTO
originala esp. versaro de ĤRIMA.
56 pĝ. Form. 11×14. Prezo: **0,60** mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

TRA LA MOVADO ◆

KRONIKO

AŬSTRIO. La gvidanto de la Kaŭkaz-ekspedicio de l' "Naturamikoj", K-do d-o Kolb, deklaris en letero al red. de "La Socialisto" sian konvinkon pri la neceso de esp-o kiel interkomprenilo, precipe post siaj spertoj pri la tri dekduoj da kaŭkazaj lingvoj. Bedaŭrinde la ekspedicio ne povis utiligi esp-on, ĉar ili ne renkontis esp-istojn! Antaŭe tiu K-do skeptike rilatis al nia movado. — *PORTUGALIO. Lisbono*. La 21-an de majo okazis fondiĝo de "Ligo de Okcidentaj Esp-istoj", kiu celas pliviglígi la movadon en la okcidentaj kvartaloj de Lisbono inter la laboristaro, kiu konsistigas la plej grandan parton de l' loĝantaro en tiuj kvartaloj. La 5 fondintoj de tiu "Ligo" estas SAT-anoj. La Komitato konsistas el K-doj Almeida, A. Marques, J. Andrade, J. C. Escada, I. A. Barros, kiuj aranĝas kursgvidadon, radio-aferojn, ĥorojn k muzik-aferojn, financojn, bibliotekon ktp. Ĝis nun funkciis 2 kursoj kun proks. 100 lernantoj (gvidas SAT-anoj). La nombro da "Liganoj" superas jam 200. Komence de okt. malfermiĝis pluaj kursoj. La entuziasmo por la movado kreskas pli k pli. (15 367.) — *SOVETIO. Ivanovo-Vozn.* Okazis internacia vespero en la klubo de l' plej granda teksfabriko. Ĉeestis 30 polit. elmigrintoj, studentoj de Leninlernejo en Moskvo. La paroladoj estis tradukataj rusen; sed mankis tradukanto por K-do el *Koreo*. Ĉar li portis SAT-insignon, la 5 ĉeestantaj esp-istoj vokis, ke li parolu esp-e. Poste sekvis propagandaj paroloj de l' sekret. de la loka esp-istaro. (Stef.) — *Leningrad*. La Leningr. *Radio*stacio (ondlongo 1000 m.) disaŭdigas esp. informbultenon je 22. k 29. okt. (22.05 h. ĝis 22.30 h. MET). Informu nepre pri aŭdeblo. Adr.: Radio-Centro, Esp. Fako, *Leningrad*. (Resp. gar.) (1473.)

RECENZEJO ◆

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Léon Bergiers, ILI. 80 pĝ. Form. 17×21 cm. Kun ilustroj de *Lucien Gilles*. Prezo: 1,80 mk. g. Eldonis: SAT, 23 rue Boyer, Paris XX. Admin. Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Ilin, la malriĉulojn, sed ne tute la malfeliĉulojn, ĉar ili estas viglaj k esperplenaj, pripentradis K-do Leon Berĵie *(Léon Bergiers)* en diversaj rakontoj, kies unueco kuŝas en ĉiama revoluciema prezento de flandra proletaro.

Certe, L. B. mem estas junfortoplena sana flandro. Liajn bildojn pri kermesoj en lia landeto, pri amo pagana de la vilaĝanoj, nutris riĉa sango de ĝoja raso. Jes, persekutita estas tiu popolo per kapitalismaj laboroj, militoj, polico, sed en ĝia sano mem kuŝas la plej certa promeso pri proksimaj liberiĝoj. Tiun plenvivon, jam ĝojan malgraŭ la turmenta ĝisnuna sklaveco, plej bone esprimas la vivoplena B.

Kaj mi ne ĉiam ŝatas la rezulton, kiam B. streĉas sian plumon por literature ĝemi. Tiu plendado ĉe li ŝajnas artifika. Protesti, vekrii, lukti, venki oni povas sen ĝemadi; k ĝemada voĉo, eĉ ĉe la plej sinceraj romantikuloj, plej ofte ridindiĝas, ne trafas.

Multaj nigraj strekoj en la rakontoj de B. ne fluas tiom nature el talenta fonto, ŝajnas al mi, kiom la varmaj bildoj pri ĝojo vivi, ami, seksumi, k lukti kontraŭ persekuto, kun vivo k viglo sur la vizaĝo.

Bedaŭrinde mi trovis sufiĉe multajn preserarojn, kio estas speciale ĉagrena en eldonaĵo de SAT.

Jief.

Julio Baghy, Viktimoj. Ĉefkomisio de Hung. Esp. Societo Laborista, Budapest. Havebla ĉe Admin. de SAT, Leipzig. 237 pĝ. Form. 12×17 cm. Prezo broŝ. 4 mk. g., bind. 4.50 k 6.— mk. g.

Dua eldono de iu romano aperanta en nia lingvo pruvas, ke la verko estas ŝatata. La romano de Baghy meritas certe tion. La aŭtoro estas bona psikologo k pentras lerte k kun talento siajn realajn travivojn en la rusa militkaptiteco. Ni plene simpatias kun li. La libro meritas ĉies atenton k estas rekomendinda. Ni bedaŭras nur la tro multajn preserarojn, kiujn la eldonisto nepre devis eviti en la dua eldono.

S. G.—K.

La Junulino el Stormyr, de Selma Lagerlöf, trad. el la sveda, O. Frode. Eld. Eldona Societo Esperanto, *Stockholm I*. Formato: 20×14; 94 pĝ. Prezo: Kr. 1.50.

La aŭtorino de ĉi tiu romaneto verkis i. a. libron, kiu plaĉis al la katolikoj k, post vojaĝo al Jerusalemo, "Kristlegendoj"-n k "Jerusalem"-on (kiu priskribis religian vekiĝon en iu sveda provinco), sekve de kiu "elmigris parto de la loĝantaro al Palestino". Post tiu informo, oni ne surpriziĝu, ke la heroino de ĉi tiu verko estas malpli homo ol enkorpiĝo de kristana "virto". Ŝi sin oferas por tri sinsekvaj personoj, kiuj malbonege traktis ŝin k tiu oferado laŭŝajne daŭris la vivon, ĉar ŝi edziniĝis kun unu el la malinduloj. Oni bedaŭru, ke la aŭtorino malŝparis literaturan talenton sufiĉan por gajni, i. a. honoroj, la Nobel-premion, por

helpi la daŭrigon de kredo je fe-rakontoj. Tamen, se oni havas kuraĝon legi post la unua ĉapitro, en kiu la sankto de juro per Biblio estas ĉefa temo, oni trovos en ĉi tiu libro, kies tradukinto ĝenerale bone faris sian laboron, sciigon pri la kampara viv-maniero en Svedio lastan jarcenton. *E. K. L.*

Komunista Biblioteko: Programo de Komunista Internacio. Eldonis: Komfrakcio de SEU, Moskvo 1930. Prezo 60 kop. Trad. el rusa lingvo G. Filipov k A. Ŝisler. 119 pĝ. Form. 12×16 cm. Havebla ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig.

Tiu Programo de Komintern estis akceptita la 1-an de septembro 1928 dum ĝia 6-a kongreso en Moskvo. Ĝi montras la vidpunkton de Komintern rilate al ĉiuj aktualaj politikaj problemoj, en la nuna stato de l' evoluo. Ke tiu pozicio ne estas fiksa k daŭra, evidentiĝas el noto, kiu antaŭ nelonge trapasis la kom. gazetaron, diranta, ke estas intencite ellabori novan Programon. En tiu okazo la eldonintoj ja preferinde estus prokrastintaj la aperigon de l' broŝuro! *N. B.*

E. Ivnickij, Esperantista Traktoro. Eld. CK SEU, Moskvo. 1930. "Ni legu esperante". Esperanto-rusa biblioteko. Prezo 7 kop. 15 pĝ. Form. 11×15½. Havebla ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig.

Rakonteto represita el "S-ulo", kun ruslingva enkonduko klariga. Teksto dulingva.

Biblioteko Nova Kulturo: La Talantoj de P. Danov. Eld. en Burgas (Bulgario). Form. 12×20. 27 pĝ. Prezo nemontrita. Broŝuro de religia sekto.

Okamoto - Rikiĉi, Evangelio de Eterna Vivo. Evangelioj de Belismo. Volumo II. Eld. Bikjo-Ningen-Kai. Prezo 0,25 jen. Havebla ĉe O. Rikiĉi, Kacurajama, Tomiokamura, *Ŝizuoka-ken,* Japanio.

La legado de tiu dua volumeto seniluziigis min post la unua pri "spirita korpo", en kiu la tezoj estis science bazitaj. La aŭtoro, kiu evidente sentas sin ligita kun la proletaro k parolas al la laboristaro, prezentas filozofion kontraŭan al la materialismo, — klaran dualismon. Por li "la spiritaj molekuloj havas apartan econ". ...kvankam "ili tre similas al la materiaj, almenaŭ laŭ la strukturo." Ĉi tie ne plu temas pri scienca esplorado, sed pri hipotezoj k kredoj. Konsekvence rezultas el tiuj asertoj la tezo, ke "la kompletigita homo, liberiĝinte de sia materia korpo, eniras senliman k senfinan gloran vivon." Estas la kredo je eterna vivo de l' individuo, kredo je paradizo. *N. B.*

Gvidlibroj

Wiesbaden apud Rejno (Germ.). Gvidlibreto riĉe ilustrita, bele presita, pri la fama kuracloko, belega loĝ- k ĝardenurbo (44 bildoj k urboplano). Senpage havebla ĉe: *Städt. Verkehrsamt Wiesbaden.* Ĝi estas la 4-a eldono esp. lingva de l' gvidlibro por tiu urbo.

Tallinn, ĉefurbo de Estonio. Gvidlibro, eldonita de Esperanta Turista Komisiono, postkast 6, *Tallinn.* 16 pĝ. k kovrilo. Priskribo k ekskurs-plano, bildoj.

Gvidlibro tra Upsala. Eld. Esperanta Turista Komisiono, *Upsala.* Svedio. 16 pĝ. Priskribo k bildoj pri tiu antikva, je historiaj memoroj riĉa urbo.

Sigtuna, Skokloster k Upsala. Eld. Trafikasocio Mälaren - Hjälmaren, Kornhamnstorg 6, III, *Stockholm.* Priskribo de la lagvojo al la nomitaj tri lokoj k de la tieaj vidindaĵoj. Kun multaj belaj ilustroj. Trilingva (sveda, angla, esperanta). Senpaga por ĉiu vojaĝanto.

Verda Libertempo en Italujo. Prospekto 4-paĝa pri Turisma Esperantista Karavano Milano-Como-Alpaj Lagoj (kiu estis aranĝita de 27. 8. ĝis 2. 9. 30). Eldonis Esp. Oficejo, *Como,* Via Vittorio Emanuele 28.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Hamb. Volkszeitung, Hamburg, 29. 9., let. el Italio (303); *Aichfelder Ztg.,* Knittelfeld, 15. 2., spertoj de radiotelegr.; *Golos Rabselkora,* Ivanovo-Vozn., n-oj 6/7, pri ĵurnal. en Britio (308), katolikismo en Jap. (308); *Vsegda Gotov,* Ivanovo-Vozn., n-o 23, ekskurso al Ferrerlernejo (305/6).

Represis el "La Lernanto":

Le Matérialiste, Bruselo, sept., konsciiĝo de knabo (Multatuli).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Labour Woman, London, okt. (rubr.); *L'Effort Syndical,* Bruselo, aŭg.; *Signalen,* Stokholm, 2. 10.; *Le Tram Belge,* Bruselo, 1. 9.; *Neue Ztg.,* München/Nürnberg, 19. 9., 15. 9.; *Aichfelder Ztg.,* Knittelfeld, 28. 6., 12. 7., 26. 7., 7. 6., 21. 6., 1. 3., 10. 5., 24. 5., 4. 1., 8. 2.; *Le Populaire,* Paris, 8. 10.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 8. 10.

Pri SAT-Kongreso raportis:

L'Avenir de Tonkin, Hindoĉinio, 6. 8. (per depeŝo rap.); *Neue Ztg.,* München/Nürnberg. 16. 9.; *Freiberger Volksztg.,* 25. 9.

Peresper. materialon enpresis:

Hamburger Volksztg., 29. 9.; *Neue Ztg.,* München/Nürnberg, 9. 9., 17. 9., 15. 9.; *Golos Rabselkora,* Ivanovo-Vozn., n-oj 3, 4, 5, 6, 7; *Vsegda Gotov,* Ivanovo-Vozn., n-o 24 (en sama gazeto de okt. kurso enpresiĝas).

NIA POŜTO

Al multaj. — La kongresprotokolo troviĝas en la presejo k aperos post nelonge. Atentu aperontan anoncon!

9951. — "LNE" sendita. Viaj versaĵoj taŭgas, ankaŭ la rakonto.

13 532. — Dankon pro via let. Ni ŝatus de tempo al tempo rap. pri tiea situacio por "S-ulo".

6707. — Ni povos enpresigi vian artik. nur, se vi permesos al ni ĝin tre koncizigi (mankas loko). Verku koncize k pri faktoj! *Red.*

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Richard Ackermann, *Ullrichsthal, 137,* N.-Bohemio, kĉl, PI, PM, bfl. Certe resp.

FRANCIO

K-do P. Pichon (instruisto), *Etriché,* Maine et Loire, kĉl, pri ĉ. temoj, pref. kun instruistoj k botanikistoj.

Sendu 30 aŭ pli da div. PM, mi sendos samkvanton, kĉl, C. Baudet, 36 Rue de Flandre, *Paris 19.*

GERMANIO

K-do Karl Klein, Krausen, 19, *Solingen-Wald,* serĉas viglan korespanton por perfektigi sin, L, PK, pri ĉ. temoj kĉl.

K-do A. Gärtner, Arndtstr. 25-b, H. II., *Leipzig S 3,* kĉl, pri ĉ. temoj, pref. kun francianoj k sovetianoj.

K-do Alfred Ballin, Delitzscher Str. 2, *Schkeuditz,* kĉl, L, PK, PI, por pruvi al nia urbo la ekziston de esp.

— Juna germano dez. koresp. kun Turkio, Italio, Ĉinio, Sud-Afriko, Usono, Aŭstralio k Balkanlandoj. Adr.: Ferdinand Anlauf, Linden tr. 20/I., *Rabenau/Sa.*

— 18 jara K-do koresp. kĉl. Certe resp. Adr.: Anton Reiter, Steinstr. 19, *Frankenthal/Pfalz.*

K-doj Theo Ruppert, Riedstr. 15, *Flörsheim/Main,* Erwin Rosenfelder, Neckarstr. 18, Heinrich Münch, Alte Kirchstr. 66, *Rüsselsheim,* kĉl, PI. Resp. garantiata.

— Studento, kiu ankoraŭ ĉi-jare transloĝiĝos Berlinon serĉas korespantinon en Berlino. Skribu al: Ladislaus Welward, Amalienstr. 24/III., *Karlsruhe/Bad.*

— Prol. Esp. Sekcio Dresden-Plauen aranĝas la 19./11. letervesperon k petas subtenon de ĉl. Gek-doj. Resp. garantiata, almenaŭ unufoje al ĉiu. Adr.: K-do Fritz Riedel, Scheidemantelstr. 9, ptr., *Dresden-Reick.*

HUNGARIO

K-do Eŭgeno Vinhoffer (ĉambropentristo), Plebaniastr. 31, *Szambathely,* kĉl, pri ĉ. temoj.

Gek-doj ĉiulandaj! ★

Por nia ekspozicio, aranĝota la 2. 11. 1930 sendu multnombre ekspoziciaĵojn, L, PI, ktp. Ni certe ĉion rekompencos. Skribu tuj k amase al K-do Paul Lembke (14 205), Lerchenstr. 23, *Neumünster/Holst.*

ENHAVO

	pago
Religio kaj militismo en Portugalio	**25**
A.B.F. — Kleriga Asocio de Laboristoj en Svedujo	**26**
Paniko en Japanio	**26—27**
La klasbatalo tra la mondo	**27**
Arta servo dum politika agitado	**27**
Tiuj porkoj-junuloj	**28**
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	**28—29**
Por nia distro	**29**
La kanto pri sorĉpova kremlulo	**29**
Tra Esperantio	**30—32**
Korespondado	**32**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)